# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (884) • 2010 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



Lignaj “tombŝtonoj”, en formo de staranta boato.
Dum kongresa ekskurso al Szatmárcseke.

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132. Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI - BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Inter ili neniu havis mankon | 99 |
| Ekumenismo komence de la 3-a jarmilo | 102 |
| Amnestio Internacia ankoraŭ ĉiam havas ekzistorajton | 105 |
| Invito al kongreso 2011, en Poděbrady | 106 |
| Aliĝilo | 109 |
| Ni bezonas modelojn, sanktulojn | 111 |
| Enkonduke | 112 |
| Kara Siegfried | 118 |
| Mi memoras | 119 |
| | 120 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Lasttempe mi legas kelkajn librojn samtempe, kiuj pli malpli ĉirkaŭas la saman temon – la bazon kaj la evoluon de kristanismo. Estas interese ricevi diversajn vidpunktojn kaj tuj kompari ilin aŭ/kaj ricevi kompletigon. Unu instigo por tiu legado estis la ĉi-somera kongresa temo kiu pritraktis la unuajn kristanajn komunumojn post la ĉieliro de Kristo. Ankaŭ vi povas legi iom pri tiu tempo en tiu ĉi numero kaj mi publikigos daŭrigon en la sekvonta numero. Ankoraŭ vivas la memoroj de la somera kongreso kaj mi havas pli da interesaj kontribuoj por publikigi. Mi esperas ke vi, kiuj ne povis surloke aŭskulti la prelegojn, ĝuas legi ilin. Kaj por ni, kiuj ĉeestis, ili donas eblecon pli bone studi la temojn. Kelkajn memorajn bildojn vi trovas dorsflanke.

Ni jam komencas plani por la sekvontjara kongreso. Jen vi trovas informon kaj aliĝilon meze de tiu ĉi numero.

# Inter ili neniu havis mankon

## Prelego dum la KELI kongreso en Beregdaróc, 2010

Éva Farkas-Tatár, HU

Kiam pasintjare ni decidis denove inviti KELI kongreson en nian landon, ni devis doni ankaŭ temon por la tuta kunestado. Tiam ni elektis ĉi tiujn kvin vortojn. Mi pensas, ke vi ĉiuj scias de kie ni ĉerpis tion, tamen nun mi legos al vi ankaŭ la ĉirkaŭajn frazojn el la libro pri la Agoj de la apostoloj, el la kvara ĉapitro, de la 32-a ĝis la 37-a versoj [sube]. Brilan bildon prezentas tiuj kelkaj versikloj pri la vivo de la unuaj kristanoj, pri la vivo de la unua kristana komunumo en Jerusalemo. Tiujn frazojn ni kuraĝis mencii ankaŭ dum la komunisma regado, tial kelkfoje oni iom bonvole diris, ke Jesuo estis la unua komunisto. Ĉu kelkaj el vi rememoras pri tio?

Sed nia Biblio estas ne nur sankta libro, sed ankaŭ tre honesta libro. Por, ke ni ne pensadu iom rezigne pri tiuj "sanktuloj", kun nostalgio pri tia sindona, kristana vivo en la komunumo – tuj post ĉi lastaj vortoj, la sekva frazo tiel komenciĝas: *"Sed, unu viro, nomata Ananias kun sia edzino Saphira ..."*. Kaj estas skribita la hontinda mensogo de la geedzoj, kiuj deziris akiri ankaŭ reputacion en la komunumo, sed samtempe ankaŭ konservi por si iom el la forvendita posedaĵo. Ilia puno, la subita morto certe pligrandigis la efikon de la apostoloj. Pro miraklaj sanigoj la popolo gloris ilin kaj la komunumo kreskis. Sed nun ni iom pensu tre reale pri tio: se ili forvendis bienojn, domojn kion ili faris kaj el kio ili vivis? Ne ofte oni parolas pri tiu erara eskatologio de la unuaj kristanoj, ke ili atendis baldaŭan revenon de Jesuo Kristo kaj tion pensante ili sentis superflua, ke ili okupiĝu pri vivtenado. Ankaŭ la apostolo Paŭlo unue tiel esperis – aŭskultu en la unua epistolo al la Tesalonikanoj 4-a ĉapitro 15-17. *Ĉar ni diras al vi per la vorto de la Sinjoro, ke ni, kiuj estos vivaj, restantaj ĝis la alveno de la Sinjoro, tute ne havos lokon antaŭ la endormiĝintoj. Ĉar la Sinjoro mem malsupren-*

---

La amaso de la fiduloj estis unukora kaj unuanima kaj neniu el ili nomis ion el siaj posedaĵoj sia propraĵo, sed ĉe ili ĉio estis komuna. Kun granda potenco la apostoloj faris atestaĵon pri la releviĝo de la Sinjoro Jesuo, kaj granda graco estis sur ili ĉiuj. **Neniu inter ili ja havis mankon,** ĉar ĉiuj posedantoj de terpecoj aŭ domoj vendis ilin, alportis la enspezojn de la venditaĵoj, kaj metis tion antaŭ la piedoj de la apostoloj. Oni disdonis al ĉiuj, laŭ tio kion ĉiu bezonis. Certa Jozef, kiu de la apostoloj ricevis la kromnomon Barnabas (tio estas en traduko Filo de Konsolo), Levido, Kiprano laŭ deveno, posedis terpecon; li vendis ĝin, alportis la monsumon kej metis ĝin antaŭ la piedoj de la apostoloj. Agoj 4, 32-37

Laŭ la traduko de G. Berveling. (Flanke de Jesuo. La Nova Testamento. vol.3).

*iros de la ĉielo, kun signalkrio, kun la voĉo de la ĉefanĝelo, kaj kun la trumpeto de Dio; kaj la mortintoj en Kristo leviĝos la unuaj; poste ni, kiuj vivas, ankoraŭ restantaj, estos kune kun ili suprenkaptitaj en la nubojn, por renkonti la Sinjoron en la aero; kaj tiel ni estos por ĉiam kun la Sinjoro.*

Sed poste ĉiam pli li kalkulis je tio, ke en la historio disvolviĝos la volo de Dio. Tiu ĉi seniluziiĝo estis forta ŝoko por la unuaj kristanoj kaj estas mirinde, ke ili travivis kaj ne rompiĝis pro tio.

La priskribo de la unua eklezia komunumo ekestis proksimume en la unuaj jaroj post la unua pentekosto. La konvertiĝo de Paŭlo, survoje al Damasko laŭ kristanaj leksikonoj okazis ĉirkaŭ 34, lia unua misia vojaĝo en 46-47 kaj jam tiam li kolektis donacojn por la malriĉaj kristanoj en Jerusalemo. Do li mem povis konvinkiĝi pri tio, kion signifis ĉi tiu falsa atendado ke Jesuo Kristo baldaŭ revenos jam ni ne okupiĝu pri ĉi tiuj surteraj aferoj: la anoj de la komunumo malriĉiĝis. Kiam pro la solvendaj problemoj en 48 en la tiel nomata Apostola Sinodo Paŭlo atingis la kompromison, ke la novaj kristanoj en Malgranda Azio kaj en Grekio ne devas sekvi la leĝojn de Moseo, do, ne devas esti unue judoj por fariĝi kristanoj, ankaŭ tie aperas la admono: ne forgesu pri la malriĉuloj de Jerusalemo. Nenie estas legeble, ke Paŭlo mencius tion, sed estas rimarkinde, kiel serioze, eĉ severe li admonas la membrojn de la novaj eklezioj kiel ili kondutu en la ĉiutaga vivo. Aŭskultu en la dua epistolo al la Tesalonikanoj 3-a ĉapitro de la 6-a ĝis la 12-a verso: *Ni ordonas al vi, fratoj, en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi vin apartigu for de ĉiu frato, kiu iradas senorde kaj ne laŭ la tradicio, kiun oni ricevis de ni. Ĉar vi mem scias, kiel vi devas nin imiti; ĉar ni ne kondutis senorde inter vi; nek manĝis panon donace de iu, sed per laboro kaj penado, nokte kaj tage laborante, por ke ni ne fariĝu ŝarĝo por iu el vi; ne kvazaŭ ni ne havus tian rajton, sed por estigi nin ekzemplo antaŭ vi, ke vi nin imitu. Ĉar eĉ kiam ni estis ĉe vi, la jenon ni ordonis al vi: Se iu ne volas labori, tiu ankaŭ ne manĝu. Ĉar ni aŭdas, ke inter vi iradas senorde kelkaj, kiuj tute ne laboras, sed en ĉies aferojn sin enŝovas. Tiajn ni ordonas kaj admonas pro la Sinjoro Jesuo Kristo, ke kviete ili laboru kaj manĝu sian propran panon.*

Estas senteble, ke la apostolo koleriĝis kontraŭ tiuj senorduloj, tial li skribas tiel krude. Certe en la komunumoj oni zorgis pri la solecaj maljunuloj aŭ malsanuloj eĉ kiam li konsilas, ke oni laboru diligente li diras: por ke li havu kion doni al la malriĉuloj.

Esence la apostolo Paŭlo en siaj epistoloj ofte surprizas nin, tiel detale li kreas leĝaron por la kristanaj komunumoj. Ni devas kompreni tion: li estis tiu, kiu klopodis atingi ĉe la estroj de la unua eklezio en Jerusalemo, ke ili konsentu, ke la judaj leĝoj, reguloj ne estu devigaj por la novaj adeptoj de Kristo. Sed poste li mem renkontis grekajn virinojn, kiuj kun sincera ĝojo akceptis la amon de Jesuo Kristo, sed ilia konduto, iliaj vestaĵoj ne ŝanĝiĝis.

Ili ne estis de jarcentoj disciplinitaj judaj virinoj, kiuj bone sciis, kie estas ilia loko en la sinagogo. Do tie Paŭlo devis okupiĝi pri tiuj problemoj, kiujn li antaŭe ne konis. Li faris tion same emocie, kaj tute konkrete. Kelkloke li mem iom retiriĝas, dirante: "*ĉi tion mi diras ne la Sinjoro*", aliloke li donas konsilojn videble en tute konkreta situacio.

Do apostolo Paŭlo renkontante problemojn devis doni instruojn kaj pri la konduto de la gefratoj kaj pri la ordo en la komunumoj. Al tiuj instruoj apartenis kion mi menciis pri la honesta laboro. Sed nun ni rigardu kiel intensive kaj detale li priskribas la kolektadon de donacoj. En la 2-a epistolo al la Korintanoj en du ĉapitroj, en la 8-a kaj la 9-a li okupiĝas pri tiu demando. Unue li raportas pri tio, kiel serioze petegis la ne riĉaj Makedonaj eklezioj, ke ankaŭ ili deziras partopreni en la donacado al la sanktuloj... *"kaj ne kiel ni esperis, sed unue ili sin dediĉis al la Sinjoro, kaj al ni per la volo de Dio."* Ili do travivis ion tian, ke Jesuo rezignis pri sia riĉeco kaj fariĝis malriĉa por ni, do tio estas nur dankesprimo, se ni ion redonas el la ricevitaj donacoj.

Tiel li laŭdas la Makedonojn al la Korintanoj kaj estas inde tralegi kiel zorge li klarigas al ili kiel tiu donacado estu serioza kaj digna, ne okazu konfuza hasto kaj malordo. Verŝajne ili ofertis varojn, objektojn kiujn ili vendis, ĉar kompreneble estis plej facile kunporti en la longa vojo monon. En la 5-a verso de la 9-a ĉapitro *"Mi do opiniis necesa, peti la fratojn, ke ili antaŭe iru al vi kaj antaŭe pretigu vian delonge promesitan helpmonon, por ke tio estu preta, kiel volonte donita, kaj ne kiel eldevigita."*

Paŭlo sobre atentigas la gefratojn, ke ili ne forflugu: "*mi diras tion, ne por ke aliaj estu faciligataj kaj vi premataj, sed laŭ egaleco: via abundo nuntempe fariĝu por ilia manko, por ke ilia abundo fariĝu por via manko, por ke estu egaleco: kiel estas skribite: Tiu kiu kolektis pli, ne havis superflue, kaj tiu, kiu kolektis malpli, ne havis mankon.*" Vi certe memoras pri la kolektado de la manao en la dezerto.

Mi konis junan kristanan studenton, kiu laboris unu monaton somere kaj estis feliĉega, ke li ricevis sian unuan salajron kaj irante hejmen, plena de fervoro, li enmetis la tutan sumon en la ĉapon de almozulo. Kaj …lia patrino devis zorgi pri li kaj aĉeti ĉion en la komenco de la studjaro. Ĉu tiel ni donacu? Sed ni spertis ankaŭ tion, kiam ni vizitis maljunulinon, de nia komunumo kaj ni transdonis al ŝi helpmonon antaŭ Kristnasko, ŝi danke transprenis kaj ŝi petis, ke ŝi deziras redoni iom kiel donacon al la preĝejo. La donacito, donacas, eĉ donacas kun ĝojo!

Sed por tio, ni devas koni unu la alian. Ĉu vi scias, kion via proksimulo en via komunumo vere malhavas? Kaj via najbarino? Eble iu plej multe dezirus nur unu orelon, kiu aŭskultus foje lin/ŝin. Ofte pli suferiga ol manko de mono estas la manko de tempo! Tion ni povas oferti kion ni havas, eble abunde – kaj la alia ne havas. Ĉu vi ne ŝuldas al iu je letero, telefonvoko?

Ni aŭskultu kiel entuziasme Paŭlo finas ĉi tiun instruadon pri la interdisdivido en la kristana komunumo: 9-a ĉap. 6-a verso: "*Tiu, kiu semas ŝpare, ankaŭ rikoltos ŝpare, kaj tiu, kiu semas malavare, ankaŭ rikoltos malavare. Ĉiu faru laŭ tio, kion li intencas en la koro, ne domaĝante, nek pro neceseco; ĉar Dio amas donacanton ĝojan*. [ĉu vi ĝojas?] *Kaj Dio povas abundigi ĉe vi ĉian gracon, por ke vi, havante ĉiam en ĉio ĉian sufiĉecon, abunde rilatu al ĉia bona faro….*"

Ni malfermu niajn korojn, ke dum nia kunestado ĉi tie nia Sinjoro renovigu en ni tiun ĝojon, kiun ni iam ricevis, sed kiu paliĝis kaj eble nun estas griza. – Karaj ni havas eternan vivon!

# Ekumenismo komence de la 3-a jarmilo

## Ĉu komenciĝas por ekumenismo la “glacia epoko”?

Prelego de ThDr. Jiří Doležal, em. pastoro de ČCE
El la ĉeĥa tradukis kaj legis Pavel POLNICKÝ, CZ

Kiam oni komencis tuj post la fino de la dua mondmilito paroli pri ekumenismo, la situacio en nia lando ne estis al tio tro favora. Kelkaj teologoj opiniis, ke tiaj ekumenaj klopodoj estas nur nelegitima eksperimento formi el frakasita kaj malfortigita kristanismo ian grandpotencan “supereklezion“, kiu povus al kristanoj rehavi perditajn poziciojn. En plejmultaj niaj paroĥejoj ankoraŭ regis profunde enradikiĝintaj antiklerikalaj sentoj: por esti bona “evangeliano“ sufiĉis esti kontraŭ Romo.

Tamen post ne tro longa tempo la situacio komencis ŝanĝiĝi – eĉ sen ekleziaj klopodoj. Baldaŭ post la



komenco de la socialisma periodo ĉiuj niaj eklezioj sentis ateisman premon, diversgradan, kaj celtrafa estiĝis la opinio: ni havas komunan malamikon, ni do estu solidaraj kaj kune defendu tion, kio al eklezioj ankoraŭ restis. Samtempe estis ĉiuj eklezioj konfrontitaj kun la tiel nomata sekulareco. Kristana mondo, kristana nacio kaj kristana kulturo – rapide fariĝis senrevena pasinteco. Interne de la sekulara socio eklezioj nehaltigeble fariĝis bagatela kaj neŝatata minoritato. En tia situacio eklezioj vidis, ke por la ebleco alparoli sekularan homon, ili devas ĉesigi centjarajn malakordojn kaj skismojn, kiuj kulpis pri grava diskreditiĝo de kristanismo.

Jam en la jaro 1948 fondiĝis en Amsterdamo la Monda Konsilio de Eklezioj (tuj grupiĝis 165 eklezioj). La papo Pius XII. ankoraŭ en la jaro 1950 eksplicite malpermesis al romkatolikoj eĉ nur debati pri ekumenismo, sed jam en la jaro 1962 la Dua Vatikana Koncilio komencis la novan epokon: en la eklezio ĝi malfermis en nekutima vasteco la pordon al la Biblio kaj samtempe ankaŭ al ekumenismo.

Sekvantajn jardekojn ni povas rememori kun profunda dankemo. Ankaŭ en nia lando ni rapide atingis: komunan agnoskon de la bapto, ekumenan tra-

dukon de la Biblio, ekumenan Preĝon de la Sinjoro kaj kredokonfeson, ekumenajn preĝdiservojn por la unueco de eklezio. La papo Pavel VI. eĉ deklaris, ke Magistro Johano Hus estis eklezia reformatoro. Post la jaro 1989 eklezioj interkonsentis pri unueca reprezentiĝo dum spirita servo en armeo kaj en malliberejoj. Okazis multnombraj, intensaj kaj valoraj diversnivelaj traktadoj de teologoj pri reciproka rekono kaj interproksimiĝo. Ankaŭ la etoso sube – je nivelo de unuopaj paroĥoj kaj komunumoj – komencis rimarkinde ŝanĝiĝi. "Ekumeno en la tereno" (laŭ Hans Küng) fariĝis realaĵo inter kristanoj de ĉiuj konfesioj.

Jen permesu mian personan rememoron: kiam mi priparolis kun katolikaj kolegoj ekumenan diservon de la preĝoktavo kaj ankaŭ traktis tion kun la presbiteroj, ilia respondo estis en suda Moravio kaj poste ankaŭ en orienta Bohemio jena: "Frato pastoro, tio neniam okazis ĉe ni kaj tio ne sukcesos!" Kaj poste kia ĝoja surprizo: preĝejoj estis plenaj kaj ni ĉiuj ĝojis pro senpretenda amikeca komunumo. Poste okazis komunaj baptoj, edziĝoj kaj eĉ "agapaj festenoj". Kiel frosta neĝo post akra vintro malaperis reciproka malfido kaj malakordo. La temo de ekumenaj konversacioj ĉesis esti ĉefe ŝtiparumo de Magistro Johano Hus, la Bartolomea nokto kaj sacerdoto Koniáš, sed male tio, kio nin kunligas.

Verŝajne oni konsentas: la 20-a jarcento estis la plej terura jarcento en la homa historio. De multaj vidpunktoj certe prave, sed kristanoj povas por ĝi danki al Dio, ĉar kontraŭe al nia anticipo, ĝuste tiu jarcento faligis la hontindajn barojn kaj per pardonado kaj repaciĝo finfine estis venkita la malamikeco, kiu inter la eklezioj daŭris dum multaj generacioj kaj kiu grandparte kontribuis al tio, ke eŭropaj nacioj forturniĝis de kristanismo.

Sed nun ni havas malantaŭe unuajn dek jarojn de la nova jarcento. Ĉu daŭras tio, kio tiom ĝojigis nin? Oni ne povas malatenti voĉojn, kiuj parolas pri la malpoviĝo kaj pri tio, ke ekumenismon minacas la "glacia epoko". Tion oni rimarkas "supre kaj malsupre". La nuna papo severigis mezurojn kaj kondiĉojn: li persistas, ke ekzistas nur unu eklezio, kiu posedas ĉiujn pridonacojn de la Sankta Spirito kaj ke nur en tiu eklezio eblas atingi saviĝon. Al unuiĝo laŭdire gvidas nur unu vojo – nur la vojo de reveno en romkatolikan eklezion. Kaj kio estas plej grava kaj malgaja: al komuna festado de la Sankta Vespermanĝo ni estas same malproksime kiel antaŭ la komenco de ekumenismo! Ankaŭ sube en la "tereno" malfortiĝas entuziasmo, malaltiĝas nombro de ekumenaj diservoj kaj nombro de partoprenantoj. En rilatoj inter unuopaj – eĉ protestantaj – eklezioj

denove aperas bedaŭrinda konkurenco, ĉiu "vartas sian sablon". Kaj precipe: kvankam ni ĉiuj vivas meze de pagana nacio, nenie ni rimarkas komunan misian strebadon. Ŝajnas al mi, ke ni ne konscias pri la fakto, ke nepre necesas komune serĉi la vojon al misia anoncado de la Evangelio.

Kion plu? Nepre estas necese kontraŭstari ekumenan laciĝon kaj kreskantan ekumenan pesimismon. La eklezio kaj ĝia unueco tamen ne estas nur afero de niaj ekumenaj strebadoj. Ni rajtas atendi, ke la Sankta Spirito donos al ni kaj al niaj posteuloj novajn kuraĝon kaj inventemon por novaj vojoj al la ekumeno. Sur tiuj vojoj ne necesas atendi grandajn saltojn, sed plej verŝajne paŝojn kaj malgrandajn paŝetojn. (Ekzemple per preparo de ia ekumena diserva minimumo, por ke ni pli bone orientiĝu en la diservoj de aliaj eklezioj – kiujn ni povas sekvi en la radio aŭ televido. Al tiu minimumo nepre apartenus adorado de la grandaj Diaj agoj, la pekdeklaroj kaj la peto por senkulpigo, legado de la Sankta Skribo, prediko de Dia vorto, Preĝo de la Sinjoro, propetoj por la ekumeno). Survoje al unueco ni devos rompi multajn barojn. La plej malfacilaj estas hegemoniaj pretendoj, postuloj je superregado kaj sopiro pri unuavicaj lokoj en la Dia popolo. Pri tio interbatiĝis jam Jesuo kun siaj unuaj disĉiploj – ja eĉ tuj post kiam ili komune festis lastan vespermanĝon de la Sinjoro (Luk 22, 24-27)!!

> Survoje al unueco
> ni devos rompi
> multajn barojn

Certe ni ne timu zorgojn, ke komenciĝas nova (kaŝita) antireformacio, kiam oni aŭdas voĉojn, kiuj husanojn nomas banditoj kaj barbaroj kaj nian "tenebran epokon" laŭdas kiel kulturan disfloron de la nacio. Ni ne lasu nin tiri en tiujn apologiojn kaj polemikojn. Tiuj en la pasinteco neniam alportis benon. Prefere ni amike interparolu kaj precipe ni komune preĝu, kantu, legu kaj ekspliku Biblion kaj ni servu al suferantoj kaj handikapuloj. Ni memoru, ke por la unueco de la eklezio ni ne preĝas solaj. Unuecon por ĉiuj disĉiploj kaj ŝafoj ĉe la Patro elpetas precipe Jesuo Kristo: "por ke ili ĉiuj estu unu" (Joh. 17, 21).

Kiam vi pensas kaj parolas pri ekumeno, vi nepre komencu per legado kaj ekspliko de Joh 10, 16; 17, 20 – 23; Efe. 4, 1-6. De tiuj vortoj estas evidenta, ke per la venko de ĉiuj malakordoj kaj malpacoj kaj post la kreo de ekumena komunumo Dio volas al la mondo klare demonstri, ke li deziras kaj kapablas pere de la potenco de senkulpigo de Jesuo Kristo superi ankaŭ ĉiujn timigajn kaj detruajn antagonismojn inter homoj kaj nacioj, rasoj kaj kastoj.

# Amnestio Internacia ankoraŭ ĉiam havas ekzistorajton!

TUINDER, Jacques, NL

La misio de la ĉie konata kaj urĝe necesa organizaĵo Amnestio Internacia, en kiu membras kompreneble ankaŭ multe da esperantistoj, estas: strebado al mondo, en kiu ĉiu homo ĝuas ĉiujn rajtojn, kiuj enestas en la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj aliaj analogaj dokumentoj internacie agnoskitaj. La organizaĵo plenumas esplorajn taskojn kaj aranĝas kampanjojn kiuj celas kontraŭi kaj haltigi gravan malrespektadon al ĉiuj ĉi rajtoj. Unu el la rajtoj temas pri hominda tegmento por ĉiu!

Al mi estis bone ekaŭdi ke en mia lando oni nun povas vidi, ĝis la deka de decembro inkluzive, foto-ekspozicion impresplenan, titolitan: “The Places We Live” (La lokoj kie ni loĝas). Kiel vizitanto oni gastas ĉe homoj en la plej dezertaj kaj plorigaj kvartalaĉoj de urboj kiel Najrobo, Jakharto, Karakaso kaj Mumbajo, dum fone oni aŭdas iliajn rakontojn forte emociigajn. Amnestio venigis ĉi tiun ekspozicion al Nederlando, ĉar ĝi perfekte kaj harmonie kongruas kun tio, kion ĝi intencas konkrete atingi rilate al la kompatindaj kvartalaĉanoj. Mondvaste pli ol miliardo da homoj 'loĝas' en plej teruraj, nepre nehomindaj kondiĉoj. La plej multaj el ili vivas vivon okupoplenan, produktivan kaj ofte inventeman. Ili havas ambiciojn kaj revojn, malgraŭ la fakto ke en la tuta mondo oni serioze neglektas iliajn rajtojn. Kiam la aŭtoritatuloj opinias, ke sur la loko de iliaj 'loĝejoj' prefere aperu luksaj apartamentoj aŭ butikaroj, oni ofte simple forpelas la loĝantojn perforte per buldozoj. Ili tiam ne ricevas antaŭ-anoncon, nek alternativan tegmenton, nek kompenson. La superularo traktas ilin kiel 'senvalorajn civitanojn'. La ekspozicio – vizitu ĝin kiam ĝi transloĝiĝos al via lando! – montras la malon klare kaj konvinke!

Dum miaj misiaj vojaĝoj mi ofte vizitis tiujn kvartalaĉojn – lastfoje ankoraŭ en Kongolando kie ili abundas en ĉiuj urboj – por servi al homoj kun okulproblemoj; homoj kiuj – se ili estus naskitaj kiel porkoj kaj havus nederlandan 'naciecon' – subtegmentus multe pli inde... En Kinŝaso mi vidis amason da rubodeponejoj, kie 'loĝas' familioj infanriĉaj, kaj oni povas vidi, ke geknaboj fosadas kaj serĉadas la tutan tagon elĉerpante iom da enspezoj por vivi hodiaŭ kaj atingi eble la morgaŭan tagon... Kaj kion diri pri neimageble povra 'instituto por vidhandikapitaj infanoj' kaj same nepriskribebla 'internulejo'? Nu, Fondaĵo Evidente klopodos iom plibonigi tiun hontigan situacion, espereble ankaŭ helpe ke KELI-anoj.

# Sekcio de kristanaj esperantistoj de ĈEA invitas vin al la KONGRESO 2 - 9. 8. 2011 en Poděbrady






**PODĚBRADY,** fama ĉarma banloko kun ĉirkaŭ 13 mil daŭraj loĝantoj, situas en Mezbohemia regiono ĉe la rivero Elbo, 50 km oriente de la ĉefurbo Prago, kun kiu ĝi konektitas per rekta aŭtoŝoseo. Poděbrady estas facile atingebla per buso, trajno kaj aŭtomobilo (parkejo ĉe la kongresejo).

Ĝi estas elserĉata precipe pro kuracado de kormalsanoj, sed ĝia trankvila ebena medio kun multaj verdaĵoj imponas ne nur al banlokaj gastoj. Krom agrablaj parkoj kun mineralaj akvofontoj ĝi allogas ankaŭ per sia kastelo kun muzeo kaj aliaj vidindaĵoj.

Por dezirantoj eblas plilongigi restadon kaj utiligi ĝin por ripozado, mendo de banlokaj proceduroj kaj por ekskursoj (info: www.lazne-podebrady.cz)



Paroĥejo



Preĝejo

**KONGRESEJO**

La kongreso okazos en la paroĥejo de Ĉeĥofrata evangelia eklezio situanta proksime al la urba centro kaj de la ĉefa banloka promenparko. Je nia dispono estos preĝejo, granda salono, klubejo kaj kuirejo.



Granda salono

Ni dormos en turisma loĝejo OSTENDE, kie estas je nia dispono 1- 4 litaj ĉambroj kun propra duŝejo kaj necesejo.



Loĝejo Ostende

**NIAJ EKSKURSAJ CELOJ:**

- skanzeno de popola arkitekturo en Přerov n/L. (kvara plej granda en Eŭropo – escepte Skandinavion – kaj la plej malnova en Ĉeĥio)



Skanzeno

- muzeo de historiaj bicikloj kaj motorcikloj
- unika mezepoka urbo Kutná Hora troviĝanta sur la UNESKO-listo



Urbo Kutná Hora

**BONVENON**

**La aliĝilon sendu al:** Pavel Polnický,
Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
Telefono : 420 325 615 651
E-mail: cea.polnicky@quick.cz

La kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.

**Kostoj** (Sumoj estas en EURoj)

La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo

| | ĝis 31.12.2010 | ĝis 31.3.2011 | post 1.4.2011 | Restadkosto |
|---|---|---|---|---|
| Kategorio A : | 20 | 30 | 40 | 140 |
| Kategorio B : | 40 | 50 | 60 | 220 (270)* |

Kategorio A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko
Kategorio B: ĉiuj aliaj landoj

* unulita ĉambro

- Monsendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
- Se eblas, uzu UEA-postĝirkonton aŭ pagu prefere al UEA por konto **kelk-p** de KELI

---

## El provizora programo:

- oficiala malfermo de la kongreso
- interkona vespero
- diservo kun sankta manĝo
- prelegoj, kantado
- koncertoj
- jarkunveno de KELI
- tuttaga busa ekskurzo al historia urbo KUTNÁ HORA
- duontagaj ekskursoj – pieda kaj busaj (detalajn informojn pli poste)
- akcepto de la urbestro

**KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA**

**fondita en la jaro 1911, invitas Vin en sia jubilea jaro**

al la 61-a KONGRESO

**2.– 9. 8. 2011, PODĚBRADY, Ĉeĥio**

# A L I Ĝ I L O

Persona nomo:............................................................ Familia nomo: ............................................................

Adreso: ............................................................ Lando: ............................................................

Telefono:. ............................................................ Retadreso: ............................................................

Mi mendas ĉambron: ☐ unu-litan ☐ du-litan ☐ 3-4 litan

Mi estas vegetarano: ☐ JES ☐ NE Kroma informo pri manĝado:............................................................

Mi preferas loĝi kun: ............................................................................................................................

Dato: ................................ ............................................................................................................

subskribo

Organizaj informoj:

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn: ☐ JES ☐ NE

Mi povus prelegi pri : ..........................................................................................

Mi postulus (specialajn dezirojn): ..................................................................

..........................................................................................................................

Mi alveturos: ☐ trajne ☐ buse ☐ aŭtomobile

kaj alvenos proksimume:.........................................................................

---

Notoj de LKK

# Ni bezonas modelojn, sanktulojn

Leif NORDENSTORM, SE

Aŭstralio ricevis sian unuan sanktulinon. La monaĥino Mary MacKillop (1842-1909), fondinto de la ordeno Sankt-Jozefaj fratulinoj de la Sankta Koro, ordeno kiu okupiĝas pri bonfarado inter la plej malriĉaj, kanoniziĝis la 17an de oktobro fare de la papo. Interesa fakto estas ke ŝi intervenis kontraŭ pastro, kiu volupte fipalpis infanon.

Mary MacKillop estas unu el tiuj virinoj kaj viroj, kiuj estas modeloj por aliaj kristanoj, kaj kiuj per siaj vivoj povas inspiri aliajn pri la kredo kaj pri bonaj faroj. Tiujn homojn oni nomas gesanktuloj. La vorto eble estas iom fremda al ni protestantoj, sed sendube Martin Luther, Dietrich Bonhoeffer, Martin Luther King kaj William Booth havas la rolon de sanktuloj en protestantaj eklezioj.

Ni bezonas sanktulojn, ĉar ili inspiras nin pri la kredo. Aŭskulti rakontojn pri sanktuloj kiuj agis ĝuste kvankam ili travivis malfacilaĵojn en siaj vivoj estas utile. Iu diris ke la sanktuloj faras malgrandajn agojn kun granda amo, kaj ke ili opinias ke tio estas grava.

Iam oni uzas la nocion ”nomsanktulo”. En iuj landoj multaj personaj nomoj estas nomoj de iamaj sanktuloj. Oni pensas ke la sanktulo, kies nomon oni portas, en aparta maniero estu onia modelo. Iam oni konsideras ke iuj gesanktuloj estas patronoj de iuj kategorioj kaj fenomenoj. Mary MacKillop tiel estus patrono de fipalpitaj infanoj.

En kelkaj landoj kelkfoje la sanktuloj okupis tro grandan rolon, kaj tiel eĉ baris la vojon inter homo kaj Dio. Tio estis unu el la kialoj, kial Martin Luther tiel severe reagis kontraŭ malĝusta kulto de sanktuloj. Tio tamen ne ŝanĝas la fakton ke ni bezonas modelojn, kaj ke Martin Luther mem eĉ estas unu el tiuj sanktuloj.

Kiuj estas viaj sanktuloj, modeloj?

Traduko el la svedlingva ĉiutaga predika blogo sjalaspis.blogspot.com

Mary MacKillop



# Enkonduke ...

## Ĉerpo el APOLOGIO de Tertuliano

Gerrit BERVELING, NL

Inter alie en la prelego de Éva Farkas-Tatár (paĝoj 99-101), la preleganto rememorigas nin pri la tiama situacio, kiam oni verkis la evangeliojn kaj leterojn al la unuaj kristanaj komunumoj. Kelkfoje ni trompas nin mem kaj komprenas la Bibliajn tekstojn laŭ nia nuna situacio kaj vivo. Mi trovis koncizan enkondukan tekston en la Apologio de Tertuliano. Ĝi donas al ni bonan fonon pri la tiutempa situacio kiam evoluis la kristanismon. /Redaktoro

Kristanismo estas religio; ĝi kondukas homojn al Dio. Tion almenaŭ ĝi volas.

Sed ni kredas, ke tiu Dio ne estas iu fora forto, tute sen ajna rilato al ĉi mondo. Ni kredas, ke Dio vokas nin homojn persone.

Tra la jarcentoj, kristanoj multege interkverelis kaj eĉ ĝissange interbatalis pri interpreto de multege da demandoj ĉiterene. Ni nuntempuloj ofte kun iom da miro retrorigardas al tiu arda interfrapiĝo. Ni ofte ne plu komprenas, kiel oni tiom agaciĝis, agitiĝis.

Por ni religio – ankaŭ kristanismo – preskaŭ fariĝis ia afero ekster la reala vivo-sfero, io eksmoda, io ne-plu-grava. Eĉ kristanoj foje tion montras, en sia sinteno.

Tial mi opinias, ke estas utile, foje retroiri al la komencaj tempoj de nia religio, por – se eble – iomete sorbi tie la etoson de la elano praa, de tiu elano, kiu venkis la timon antaŭ la martiriĝo, de tiu elano, kiu timigis la totalitaran ŝtataparaton de la Romia Imperio, tiu elano, kiu minacis ĝin krevigi. Nunmomente ni ne parolu pri tio, kio fariĝis el ĉi elano, en Mezepoko, en Epoko de Reformacio, en la nuno...

Tertuliano parolas pri Dio, kiel pri Dio, kiu disradiis kvazaŭ suno: la plej klara radio estis Jesuo. Li per tuta sia forto oratora pledas por plej absoluta libereco religia: nia Dio ne tolerus, ke oni devigus iun ajn, honori Lin. Kial la inkvizicio tion ĉi ne legis?

Li atestas pri la bazaj principoj de la kristana establo de komuna vivo: ĉion komunigi, reciproke sin subteni, ĉiun ĉirkaŭi ne per sufoka, sed per viviga amo.

Li ne tre multe parolas pri eroj de kredkonfeso: la vivo gravas unualoke por li.

Eble ni nuntempuloj tamen iom ankoraŭ povus lerni de li.

### Iom pri la historia kadro: la romia imperio

La historion de la Romia Imperio tre konvene eblas dividi en tri periodojn: unue la epoko de la Reĝoj, de 753 (la tradicia fondodato de la Urbo) ĝis 510, kiam la lastan, tiraniĝintan reĝon

Tarkvinio oni forpelis; poste la epoko de l' Respubliko, kiun karakterizas iu obstina provado, malebligi rean tiraniĝon de kiu ajn oficisto aŭ funkciulo: por ĉiuj funkcioj oni elektis ĉiam minimume po du kolegoj, kiuj sin reciproke kontrolu kaj – se necese – bremsu: tiom oni timegis pri la eventualo de nova tiraneco. La Respublikon oni datumas kutime de 510 ĝis 27 a.K.



Tamen, la sistemo, kiu kontentige funkciis,dum Romo nur etan teritorion estris, kaj eĉ ankoraŭ relative bone ankaŭ dum la unua granda ekspansio ekster Italio (kelkajn partojn konkerante de Hispanio, Tunizio, Sud-Francio, la marbordon de [antaŭa] Jugoslavio kaj ĝis Grekujo, por indiki per modernaj nomoj), en postaj jaroj daŭre malpli kontentigis la bezonojn de la epoko: en provincoj la indiĝenaj loĝantoj estis subpremataj, la romiaj funkciuloj pli kaj pli atentis nur pri propra profito kaj la centra potenco, antaŭe ĉion reginta (la Senato de Romo) ĉiam malpli konvene reagis je la diversprovincaj problemoj, pri kiuj ili fine preskaŭ nenion plu

---

**Kelkaj imperiestroj:**

| | | |
|---|---|---|
| Aŭgusto | 31/27 a.K. - 14 p.K. | |
| Tiberio | 14-37 | |
| Kaligulo | 37-41 | murdita; lin sekvis onklo |
| Klaŭdio | 41-54 | |
| Nerono | 54-68 | murdita |
| | 68/69 | jaro triimperiestra: Galbo, Otono kaj Vitelio; ĉi internan militadon venke finis |
| Vespaziano | 69-79 | sekvita de siaj filoj |
| Tito | 79-81 | |
| Domiciano | 81-96 | murdita; la senato elektis: |
| Nervo | 96-98 | de nun adoptoj: |
| Trajano | 98-117 | |
| Hadriano | 117-138 | |
| Antonino Pio | 138-161 | |
| Marko Aŭrelio | 161-180 | kiun sekvis lia filo |
| Komodo | 180-192 | murdita de |
| Pertinakso | 192 | murdita; ĉijare fakte estis kvin imperiestroj, el kiuj montriĝis la plej forta |
| Septimio Severo | 193-211 | |

kapablis kompreni. La interligiteco de la Imperio estis minacata.

La lastan jarcenton antaŭ Kristo karakterizis tuja sinsekvo de ĉiam novaj internaj militoj: pluraj riĉaj generaloj luis soldatojn por sia propra politika celo, neniom hontante pri efektiva militado, eĉ Romon mem, ĝis tiam la ”sanktan Urbon”, oni ĉijarcente plurfoje konkeris por tie ”puni” la opozicion politikan. Mi nur mencias la plej famajn nomojn: Sullo kontraŭ Mario, Pompejo kontraŭ Cezaro, Antonio kontraŭ Oktaviano.

Per la fina venko de ĉilasta komenciĝis la tria periodo: la epoko de la Imperiestroj. Vidu apartan tekstkadron. La senato de Romo honoris Oktavianon per nove fondita titolo: Aŭgusto (moŝta). Lin sekvis novaj Cezaroj – komence el lia parencaro (kvankam helpe de adoptoj: Tiberio jam estis adoptita stiffilo...), poste senplie imperatoroj kun iom pli da bonŝanco ol la kontraŭuloj, fine ree dinastioj. Tiu ĉi periodo finiĝis – post la divido de la Romia Imperio en orientan kaj okcidentan Regnojn – okcidente en 476, oriente nur en 1453.

Tiom ĉi por doni ioman superrigardon pri la politika historio.

Teritorie la Romia Imperio el eta kerno (Romo) kreskis dum la Respublika tempo tre multe. Fine ĝi inkluzivis ĉiujn landojn ĉirkaŭ la Mediteraneo kune kun Britio, Francio, Belgio kaj la suda parto de Nederlando (Rejno estis limo); sude Saharo estis la natura limigo, dum en la Mezoriento la limoj ĉiam restis nestabilaj: Mezopotamion oni ne sukcesis konkeri kaj norde de Grekujo oni konkeris en la epoko imperiestra ĝis Rumanion.

Tiun ĉi gigantan teritorion kompreneble loĝis plurdekoj da popoloj, gentoj, triboj, kun propraj lingvoj, religioj, tradicioj. Por iom kapabli kunteni la tuton, la romia ŝtato devis esti pli malpli tolerema je minoritatoj kaj ties identeco: siajn oficialajn lingvojn (latinan okcidente, kojnean grekan oriente) ĝi ne trudis, la popolajn religiojn kaj kutimojn ĝi ne malhelpis nek kontraŭis: eĉ male: plurfoje oni oficiale transprenis kultojn al alipopolaj diaĵoj, kvazaŭ por substreki sian larĝanimecon. Sed jam tempe de Aŭgusto ekestis en Oriento kvazaŭ religia aldonaĵo: la Cezarkulto. Tie ja jam jarcentojn estis kutime, adori kiel diajn estulojn la Reĝojn (same en Mezopotamio kiel ankaŭ Egiptio jam jarmilojn eĉ!); do depost la venko paciga de Aŭgusto, lin oni adoris kun dia honoro. Kaj malgraŭ komenca kontraŭstaro fare de la senato de Romo, fine – kaj certe jam dum Domiciano – establiĝis la firma kutimo, ke ĉiuj Romianoj el kiu ajn gento aŭ popolo,



adoru la Cezaron kun dia honoro. Estis nur unu oficiala escepto: la Judoj, rekonitaj kiel religie tre speciala popolo (ili adoris ja nur unu Dion), estis liberaj je ĉi devigo. Anstataŭe unufoje jare en ilia templo en Jerusalemo oni oferis al ilia Dio JHVH, dume preĝante por la bonfarto de l' Cezaro. (Tiun ĉi escepton poste bone eluzos la komencaj kristanoj, ĉar por eksteruloj ne estis eble distingi inter kristano kaj Judo; poste tamen oni ne plu toleris ĉi escepton ĉe ne-judaj konvertitoj al ĉi kredo unu-dia; tiel estiĝis persekutoj).

Kulture la Imperio restis tre bunta tutaĵo.

Tamen el Oriento kvazaŭ inundis la helenismo. Kion kutime ni nomas la romia kulturo, tio grandaparte estas helenismo en latinlingva formo. Preskaŭ la tutan latinan literaturon ĝi kunformis.

Dank' al Aŭgusto, kiu vidis sian ĉeftaskon en la establo de paco ĉie tra la Regno, kaj dank' al la relativaj unuecoj lingva kaj kultura, regula trafiko de komercistoj, oficistoj, militistoj, verkistoj ja eĉ turistoj estis ebla kaj, kompreneble, tio plifaciligis diskonigon de novaj ideoj, idealoj, religioj.

Pluraj filozofioj – preskaŭ senescepte el helena menso laŭdevene – disvastiĝis tra l' Imperio: Epikuranoj apogis serĉadon de bonfarto kaj ĝuo, kondiĉe ke aliajn oni tiel ne nocu. Skeptikuloj kaj Cinikuloj proprastile reagis je la vivo kaj ties postuloj kaj problemoj. Stoikuloj, kvankam fidante, ke fone ĉion regas la Providenco de iu (panteisme imagita) Dio, tamen pro sia rigora sinregemo impresis ofte pesimisme: ili tre emfazis la animon, la ”dian fajreron”, kiu devus akiri la veran scion por liberiĝi el ĉi mondaj malpurigaĵoj kaj por tiel reatingi sian dian originon. Platonanoj de ĉi epoko (la Novplatonismo) ankaŭ estis ĉefe religie inspiritaj: multe ili spekulaciis pri emanaĵoj el la Plejsupera Dio.

Kaj el la sama oriento, sed ne nur el la helena parto, devenis pluraj religioj, grupiĝoj varbantaj novajn kredantojn: ekzemple el Egiptio la kulto al Izisa kaj Oziriso, aŭ Cibela el Frigio, Mitraso el Irano, ktp. Kaj ĉie renkontiĝis la judaj sinagogoj.

Kaj en tiun buntan mondon venis la frua kristanismo.

### Kiel Ekestis La Juda Diasporo

La hebrea popolo loĝis en Palestino; famaj iĝis ĝiaj reĝoj Saul, David kaj Salomono; post la morto de ĉi lasta, la regno dividiĝis en du reĝlandojn: la norda kun Samario kiel ĉefurbo, la suda – ankoraŭ sub dinastio davidida – kun Jerusalemo kiel ĉefurbo. Post Salomono, la hebreoj ne plu grave rolis en la internacia politiko de Mezoriento. Tie sendispute la ĉefrolon havis okcidente Egiptio kaj oriente Mezopotamio (nuna Irano), kiun posedis sinsekve pluraj potencoj.

En 722 a.K. Samario estis konkerita de Sargono II, la reĝo de l' Asiria Imperio. Sekvis teruraĵoj: pluraj familioj estis deportitaj al Mezopotamio, la asiria ”kern”-lando, aliaj fuĝis for, ĵus antaŭe, al la teritorio jerusalema; tien ili kunportis siajn sanktajn Skribojn. (El ties pluredakto, kune kun la ”sudaj”

tradicioj, tiuepoke komencis formiĝi la Torao, kvankam ties definitiva formo ankoraŭ pli ol jarcenton ne estis preta.)

Kaj kiuj restis en Israelo, la nordlando? Malriĉaj, nekleraj kampuloj, paŝtistoj, fiŝistoj. Finita estis la gloro. Iom pli poste la Asirianoj celis kompletigon de ĉi kultura neniigo, kiam el tute alia regiono ili deportis tien fremdan popolon kun plene fremdaj tradicio kaj religio. Sed fakte ilia provo neniigi Israelon ne prosperis: la ”fremda” popolo transprenis de la restintaj simpluloj ne nur la sanktajn librojn, sed ankaŭ la kredon je ilia Dio JHVH. Ankaŭ templon ili konstruis por Li. Sed ĉar ili genealogie ne estis ”pure” hebreaj, la pastraro de Jerusalemo, kaj eĉ ties profetoj ne pretis rekoni ilin kiel verajn kultantojn de JHVH. Laŭ sia ĉefurbo ili koniĝis kiel Samarianoj. (Ĉiam ankoraŭ ili rekonas nur la Toraon kiel Di-donitan Skribon; ĉar kvankam etnombraj, ili ankoraŭ pluekzistas.)

> denove postrestis en la lando multaj paŝtistoj, terkulturistoj, povruloj.

Okazis grandaj politikaj tertremoj en Mezoriento: la Asirianojn venkis decidige la Babelanoj. Depost nun tiuj ĉi fariĝis mastroj de la vasta Imperio.

En 587 Nebukadnecar, reĝo de Babelo, konkeris Jerusalemon. Tiun tragedion jam delonge antaŭdiradis la profeto Jeremia. Denove multaj familioj estis deportitaj al Mezopotamio, denove multaj fuĝis for, ĝuste antaŭ la venkopreno, ĉifoje i.a. granda amaso al Egiptio, kien ili kuntrenis la ĵus menciitan Jeremian. Kaj denove postrestis en la lando multaj paŝtistoj, terkulturistoj, povruloj ktp.

La jaron 539 a.K. Babelon konkeris nova potenco: Medoj kaj Persoj kune. La persa reĝo Ciro, celante favorigi al si siajn novajn regatojn, permesis sufiĉe grandskale, ke oni rekonstruu templojn, kiuj ruiniĝis tempe de la asiria aŭ babela regado. Tion ĉi utiligis pluraj Judoj por reiri al Jerusalemo, por rekonstrui tie la templon de JHVH. Ciron oni eĉ prihimnis kiel la ”Mesion” (Reĝon sanktoleitan de Dio).

Por esti ekzakta oni do ne diru, ke Ciro permesis la Judojn reiri hejmen – kun la sekvo ke la templon oni rekonstruis; tute inverse: por templorekonstruo grupo da Judoj devis tien iri (arkitektoj, pastroj, levidoj) – kun la sekvo, ke el ĉi temploregiono iom post iom estiĝis ree iaspeca juda teritorio.

En 538 Ŝeŝbacar estris la unuan grupon kiu revenis; ĝi havis la taskon, formi templejon ĉirkaŭ la rekonstruota Jerusalema sanktejo. La temploregiono devus ampleksi ankaŭ sufiĉe da paŝtejoj por la gregoj, kiuj liveru oferbestojn por la templo. La Samarianoj komence prezentis sian kunlaboremon por la laboro, sed – rifuzite ili poste provis malhelpi ĝin. Pro nesufiĉa progreso de la entrepreno, en 521 sekvis nova grupo sub Zerubabel kaj Jeŝua. Kaj jam la 13an de marto 515 la nova templo jerusalema

estis preta. Kaj depost tiam ĝi ree estis la plej grava centro de ortodoksa judismo.

Sed Judojn oni jam ne plu trovis nur en Palestino: pro ambaŭ katastrofoj supre menciitaj, ne nur multe da homoj estis deportitaj for de sia naskiĝloko, sed eĉ pli forfuĝis por trovi sendanĝeron aliloke. Kaj se ja estas fakto, ke kelkaj familioj revenis el la Ekzilo por grupiĝi ĉirkaŭ la nova templo de Jerusalema, – la granda plimulto tamen definitive restis ekster Palestino. El Egiptio ili migris suden kaj okcidenten; el Mezopotamio norden kaj orienten.

Nova grava ŝanĝiĝo politika ĉifoje estis kaŭzita de popolo ne–mezorienta: el Macedonio, kuntrenante kun si en la armeo amase batalistojn el preskaŭ ĉiuj helenaj πόλεις (urboŝtatoj), venis Aleksandro. Li konkeris en mirige mallonga tempo la tutan Persan Imperion, – eĉ plue irante ĝis la limo de Hindujo. Kiam en 323 li mortis, liaj ”diadoĥoj” dividis inter si la vastan regnon. Tiel estiĝis pluraj sendependaj ŝtatoj sed tamen ne neniiĝis lia verko: ĉar pro lia politiko de interetna geedziĝo, de ofte deviga kultura interŝanĝo, jam ekestiĝis nova kulturo: la helenismo. Do, kvankam politike ofte plej kruele interbatalantaj, ĉiuj regnoj de Grekujo ĝis Pakistano, de Afganio ĝis Egiptio (por uzi nuntempajn indikojn) interligiĝis per unu komuna kulturo, estiĝinta el elementoj helenaj sed ankaŭ el ĉiuj ceteraj regionoj de tiu terparto. La dinastio de Sirio, kiu estris ankaŭ Palestinon, provis perforte asimiligi la Judojn al la helenismo. Ili renkontis fortan reziston. La Makabeaj rezistbatalantoj ankoraŭ estas famaj. Ilia insurekcio komenciĝis en 166 a.K. en la urbeto Modein. Pro ĝi poste establiĝis en Palestino memstara dinastio juda. Sed la diasporo restis daŭre sama: ĉie – aŭ preskaŭ – oni povis renkonti Judojn.

Oni taksas la tutan loĝantaron de la Romia Imperio – ĉirkaŭ la komenciĝo de la kristana erao – je pli malpli 60.000.000 homoj. La ĉefurbo, Romo, nombris ĉirkaŭ 1,2 milionojn, dum la laŭgrandece dua urbo de la okcidenta Mediteraneo, Kartago, estis pli malpli 600.000–persona. Samepoke en Palestino mem loĝis 500.000 Judoj. Sed dise tra la Imperio Romia ne malpli ol 6.000.000 da iliaj sampopolanoj renkonteblis, dum ekster la imperio – en la Parta Regno, sed eĉ ĝis fora Hindujo kaj Ĉinio! – ilian nombron oni povas taksi je ankoraŭ pliaj 4 milionoj.

Do, el la totala juda popolo, nur eta malplimulto loĝis en la lando gepatra: 5%. Kiam, tri jarcentojn post la Makabea insurekcio, la romia Cezaro deklaris Palestinon lando malpermesita por Judoj, tio ja grave influis la historion de judismo, sed laŭprocente la diasporo ne funde ŝanĝiĝis. Tamen, en juda kompreno pri la okazaĵo, la ŝanĝiĝo ja estis tre fundamenta, kompreneble.

Diasporo fariĝis Ekzilo.

ଓ

La teksto estas ĉerpita el:
Berveling, Gerrit (tradukanto) (1982) *Tertuliano: Apologio,* el la serio Voĉoj Kristanaj, Vlaardingen

Kara Siegfried,

Unue mi dankas vin pro viaj salutoj el postkongreso en Germanio kaj el KELI-kongreso en Beregdaróc, 06-08-2010. Sur la bildkarto el la kongreso mi trovis entute 32 subsignojn. Vi skribis ke entute 40 personoj el 10 landoj partoprenis al la kongreso.

Jam delonge mi volis reagi al via Melanktono-artikolo en Dia Regno. Philipp M. estis humanisma klerulo kaj supera instruanto por edukado kaj fondinto de la moderna edukado en Eŭropo (mi legis en Wikipedia). Li estis samspirita al Erasmo. Lutero kaj Erasmo ne akordiĝis. Kial?

Lutero estis ekskomunikita en Worms en 18-04-1521. Erasmo ne ĉeestis tiun kunvenon. Li ne povis haltigi la proceson de Lutero. Erasmo ne deziris elekti nek la flankon de la Papo kaj Cezaro nek la flankon de Lutero, Melanktono kaj Zwingli. Ili deziris ke Erasmo eldiru kiun flankon li elektus, sed Erasmo ne volis. Tial Lutero provokis Erasmon. Erasmo eldonis epistolon en kiu li defendas sin kaj sekve li demandas al Lutero pri la libera aŭ mallibera homa volo. Laŭ Lutero neniu libera volo, Erasmo aliĝas al tiuj, kiuj donas ion al libera volo, sed grandparte al graco. Lutero plu mokinsultas Erasmon.

En 1524 ribelado kontraŭ la Cezaro kaj grafoj de Thomas Muenzer. Lutero devas admoni pri koncedo. La milito kostis multajn homajn vivojn. Tion antaŭvidis Erasmo. Tiutempe milito de la spiritoj ekzistis, kiel en nia tempo. Erasmo malŝatas fanatismon kaj li restis sendependa. *Nulli concedo homo per se.* (Al neniu mi volas aparteni).

Ni fartas sufiĉe bone. Lasttempe ni perdas familianojn pro morto kaj tio estas trista. Lastsemajne ni enterigis fratinon de Sietske (83).

Iren Bagi kaj Maria Laszlo, Ruth van Puenbroek kaj Eva Farkas, al tiuj virinoj mi ofte pensas kun ĝojo. Bedaŭrinde mi ne povas pli partopreni.

Korajn salutojn

Sietske kaj Leen

( Leendert Hordijk)



Graz 1963, Adolf Burkhardt

# mi me-mo-ras



Graz 1963, Rosemarie Schwartz kaj Ingalill Drobny/Nilsson

**Mi partoprenis** Universalajn Esperanto-kongresojn ek de 1959 kaj tie en la fakaj kunvenoj konatiĝis kun KELI. La jaron 1963 KELI kongresis en mia hejmlando Aŭstrio, en Graz, kiun kongreson mi ĝuis pro hejmeca etoso en kristana Esperantujo. Ekestis multaj amikaj kontaktoj kun korespondado, renkontoj kaj vizitoj. Plej impresa estis KELI-kongreso en Debrecen 1966 kun granda grupo de internacia junularo. La kuna kantado kaj ĉiutagaj ekzercoj de la ĥoruso kun nia kara Adolf Burkhardt plibeligis por mi ĉiujn kongresojn dum multaj jaroj. Al KELI mi dankas plej multajn kontaktojn kun karaj geamikoj.

*Sieglinde Stamm*

Debrecen 1966, KELI-kongreso



# KONGRESAJ MEMORAJ BILDOJ



FARKAS Antál, RO



Ĉe muelejo



Norbert Südland, DE



Glaciaĵpaŭzo dum ekskurso



Tagmanĝa paŭzo dum ekskurso



Tagmanĝa paŭzo dum ekskurso



Akva paŭzo inter prelegoj